Sukcesa laborkunveno

de la landaj ligoj en Herzberg - la Esperanto-urbo

De la 2a ĝis la 4a de novembro kunvenis en Herzberg 23 reprezentantoj de la landaj ligoj kaj kelkaj GEA-estraranoj por priparoli la estontan kunlaboron interne de GEA.

Ĉeestis reprezentantoj el preskaŭ ĉiu federacia lando kaj tri fakaj asocioj. Nur mankis la reprezentantoj el Bremeno, Hamburgo, Sarlando, Hesio kaj Turingio. En la lastaj du landoj landaj ligoj ne plu aktivas. La sarlandaj esperantistoj ankoraŭ ne membras en GEA.

La urbestro Gerhard Walter (meze) post interparolado kun la prezidanto d-ro Rudolf Fischer (dekstre) kaj la vicprezidanto Andreas Emmerich de GEA.

La kunveno komenciĝis per afablaj salutvortoj de urbestro Gerhard Walter, kiu bonvenigis la reprezentantojn en la Esperanto-urbo Herzberg. Sabaton matene d-ro Wolfgang Schwarz el Dresdeno prelegis pri siaj spertoj por la konservado de nia kultura kaj asocia heredaĵo. Li citis multege da ekzemploj precipe el Dresdeno kaj Saksujo. Nome de la GEA-estraro d-ro Rudolf Fischer informis pri la aktualaj projektoj de la estraro. Plej urĝas momente la plibonigo de la membroadministrado. La estraro konsentis investi en pli bona administra programo monon, ĉar sen glate funkcianta membroadministrado la asocia laboro lamas. Fischer pledas alvoki la membrojn donaci malavare, por ke la asocio estonte povu pli rapide kaj laborŝpare servi al la membroj.

Posttagmeze la redaktoro de *Esperanto aktuell* Alfred Schubert prezentis siajn ideojn pri la estonteco de la gazeto. Lia celo estas plialtigi la eldonkvanton. Nur tiel oni povas ŝpari monon.

Peter Zilvar (maldekstre) dankis al la estro de Jägerhof, kiu prezentis novan esperantlingvan manĝokarton.

Schubert vidas eblecojn inter gejunuloj, ne-GEJ-anoj kaj membroj de aliaj Esperanto-asocioj kaj ankaŭ klientojn ekster la movado, kiuj interesiĝas pri temoj kiel mondlingva problemo, internacia kunlaboro, unu-mondo ks. La unua paŝo estu pli bona kaj enhavoriĉa gazeto. Necesas ankaŭ ŝanĝi la nomon de la gazeto, ĉar en la tempo de retpoŝto kaj interreto 6-foje jare aperanta gazeto ne plu povas nomi sin “aktuala”. Schubert pledis por aperigo de po 208 paĝoj jare anstataŭ la nunaj 160 paĝoj. En la unua paŝo eventuale necesus redukti la aperritmon al kvar numeroj jare. La propono pri la nomŝanĝo kaj la redukto de la aperritmo renkontis grandan malaprobon de la plej multaj ĉeestantoj.

Poste la ĉeestantoj diskutis pri la daŭrigo de la laboroj inter la landaj ligoj. Ni interkonsentis refoje kunveni pentekoste dum la GEK en Essen kaj denove organizi laborsemajnfinon je la dua semajnfino en novembro 2008.

Peter Kühnel raportis pri la stato de la rekonstruo de la Esperanto-domo en Berlino. Malgraŭ la manko de mono kaj laborfortoj la laboroj progresis. Li esperas, ke la antaŭa domo baldaŭ estos preta. Zsófia Kóródy de ICH kaj AGEI prezentis sian aktualan projekton kolekti la adresojn de instruistoj kaj kursgvidantoj kiuj instruas aŭ intencas instrui Esperanton en lernejoj kaj popolaj altlernejoj. Alois Eder prezentis iniciativon de BAVELO alskribi ĉiun lernejon en la lando por atentigi ilin pri

Dum la kunveno lernantino intervjuis la urbestron de Herzberg – la Esperanto-urbo, Gerhard Walter.

Esperanto. BAVELO planas varbi por nia afero en la ekspozicio *didacta*, kiu okazos en Stuttgart en februaro 2008.

Post la vespermanĝo Peter Zilvar donis koncizajn informojn pri la Esperanto-urbo kaj ĝemelurbaj kontaktoj pere de Esperanto. La lasta parto de la renkontiĝo estis dediĉata al laborgrupoj kiuj diskutis la problemkampojn financoj, lernado kaj informado.

Resume oni povas diri, ke la laborkunsido estis sukcesa. Ĝi aktivigis la partoprenantojn kaj donis novajn impulsojn al kelkaj projektoj. Klare, ne ĉiun problemon de nia asocio oni solvis, sed ni faris grandan paŝon antaŭen.

Wolfgang Bohr

La partoprenantoj de la laborkunveno en Herzberg - la Esperanto-urbo.